

AMUZU, LERNU KAJ RIDU!

① KREU NOVAJN VORTOJN

aldonante (a) unu literon en la internon aŭ

forprenante (f) unu literon el la interno aŭ

ŝanĝante (ŝ) unu literon en la interno de la donita vorto.

(Ekzemploj: *kor_o* (a) > *korbo*, *saŭno* (f) > *sano*, *nomo* (ŝ) > *noto*)

Skribu la aldonitajn, forprenitajn aŭ ŝanĝitajn literojn laŭvice en la subajn kvadratetojn. Ĉe „ŝ“-vortoj estas la ŝanĝota litero grasa kaj ĉe kelkaj vortoj estas helpiloj.

La kaŝvortoj kompletigas la proverbon: Kiu ne ...

1 ko_to....(a) ĉedoma spaco

2 vana.....(ŝ) alkoholaĵa

3 kino.....(ŝ) tuŝo de lipoj

4 kulo.....(ŝ) manĝaĵo

5 kanapo .(f) ŝraubtenilo

6 kasto(f) besto

7 kapo..... (ŝ) besto

8 p_eto.... (a)

9 vando... (ŝ) lezo

10 ka_to.... (a)

11 a_ro..... (a)

12 pugno... (f)

13 bo_to ... (a)

14 fojno (f)

15 kanto.... (f)

16 mono ... (ŝ)

17 ma_to... (a)

1	2	3	4	5	6

,

7	8	9

10	11

12	13	14	15	16	17

② KIUJ NUMEROJ ANSTATAŬOS DEMANDSIGNOJN?

3	5	8
??	???	13
55	34	21

③ DIVENU!

Miloj da soldatetoj iras kune al milito, ĉiuj ĵetas siajn lancojn kiuj pike falas teren.

Kvankam ŝajnas strange. Certas, ke tiu sinjoro per sia kapo frapegas kaj ne sentas doloron.

Elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco

④

M A L B O N A E L E K T O

Kossi S.Woudji, Togolando/Senegal El „Kontakto", n-ro 231 (2009/3)

Dio kreis Afrikon kaj la ceterajn mondopartojn, poste nigrulojn kaj blankulojn. En Afriko Dio lokis tion, kio povas plaĉi al la kreitaj homoj: mult-nombrajn bestojn por ĉasistoj, fiŝriĉajn riverojn por fiŝkaptistoj, fruktojn, kiujn oni povas kolekti sen granda peno, kaj ĉiam-varman veteron. En la ceterajn partojn de la mondo Dio metis malvarmon, glacieron, neĝon, malbonan teron, sed ankaŭ librojn kaj la sciojn, kiujn ili enhavas. Post tio Dio demandis unue la nigrulojn, kion ili volas elekti por si. La nigruloj elektis Afrikon, kaj la blankuloj do devis kontentiĝi pri la cetera mondo. Nu, la estonteco montris, ke la nigruloj faris grandegan eraron. Certe, la blankuloj ĉiam suferis pro malvarmo kaj devis ĉiam multe labori por eltiri manĝaĵojn el la nefruktodona tero, sed la scienca enhavo de la libroj donis al ili mirindajn povojn, dank' al kiuj ili sukcesis konstrui komfortajn domojn, fari varmigajn vestojn kaj devigi la teron doni al ili grandan kvanton da fruktoj. Kompreninte sian eraregon, la nigruloj nun deziras kleriĝi. Kaj nun ili multon lernas ĉe la blankuloj.

JA 2009/3, paĝo 50

⑤

L U D U P E R H O M O N I M O J !

Ĉu vi scias, kio estas homonimo? Homonimo estas vorto, kiu havas du tute malsamajn sencojn. Ĉiu lingvo, ankaŭ la plej logika Esperanto, havas homonimojn. Por ilustrati la konstaton mi mencias, ekzemple, la vorton: baleto. Aŭdante ĝin verŝajne ĉiu tuj pensas pri speciala dancarto. Sed en nia lingvo ĝi povas havi ankaŭ alian senco, ĉu ne, nome malgrandan balon, ĉar -et estas sufikso, kiu malgrandigas. Ĉi-sube ni prezentas al vi kelkajn „humurajn miskomprenojn" pro homonimoj.

kolego - Joĉjo havas tri kolegojn. - Ĉu unu ne sufiĉas? Mi estas kontenta pri unu simpla kolo. (kol-ego)

papago - Dio kreis homon, kaj per sia krea agado papo sukcesis estigi papagon. (pap-ago)

papero - Mi aŭdis, ke vi kolektas raraĵojn. Jen ganto, kiun perdis la papo. Ĉu vi aĉetos? Fakte, mi kolektas raraĵojn, sed paperon ne. (pap-ero)

okuloj - Prezentu al vi, Manjo diras, ke por ok uloj, malbone vidantaj, sufiĉas du okulvitroj. Ĉu ni devas tiom ŝpari pro la ekonomia krizo? (ok-uloj)

citrono - Paĉjo, helpu min. Mi deziras muzikilon, citron. Nun mi havas unu citronon. Diru al mi, kiom da citronoj rezultigas citron. (citr-ono)

kulero - Ho, Peĉjo! Mi sukcesis kapti kulon. Jen vidu, mi deŝiras flugilon, donas ĝin al vi kaj nun vi havas kuleron, per kiu vi povos manĝi. (kul-ero)

katara - Mia edzino delonge havas kataron. - Ĉu la kuracisto ne povas helpi? - Ne, li estas tute senpova. Ŝi ne estas kuracebla. (kat-aro)

vitri - Ne ekzistas vera egaleco. Vitrinon oni povas aĉeti, sed vir-vitron ne. (vitri-ino)

investo - Ĉu denove investo? Ni ĉiam perdas per viaj investoj. Ĉu ne provi, almenaŭ unufoje, vir-veston? (in-vesto)

kukurbo Ĉu vi dezirus vivi en kukurbo? Tie vi ĉiam povus manĝi kukon, Ĉu ne? (kuk-urbo)

romano - Laŭ statistikoj en Romo troviĝas plej multaj romanoj. (Rom-ano)

pistolo - Tuj post naskiĝo mi ekhavis pistolon (pis-tolo)

Ĉu vi trovos ankoraŭ aliajn?

JA 2009/3, paĝo 44